

Terminareto de Kino

komencita far ĵ. vaŝe en jaro 2008a

kaj

tradukita de Minosun en jaro 2010a

e-Librigita de Elerno

aŭg. 2010

A

aktoro 演员

= rolisto

angorfilmo 惊悚片

filmo kaŭzanta streĉon, angoron, maltrankvilan atendon pro sugesto de diversaj danĝeroj.

en: thriller film

fr: thriller

it: film thriller

anoncfilmeto, anoncfilmo 预告片

filmeto antaŭreklamanta kinaĵon per monstro de specimenaj scenoj.

en: preview, trailer

fr: bande-annonce

it: trailer

aventurfilmo 冒险片

filmo prezentanta venkon de grandaj danĝeroj fare de la ĉefroluloj, plejofte en ekzotika aŭ nekutima medio.

en: adventure film

fr: film d'aventure

it: film d'avventura

B

b-filmo B 级片；低成本影片

filmo farita per malgrandaj rimedoj, malmulta mono.

en: b movie

fr: série b

it: film di serie b

bildefekto 视觉效果

arta almeto al la bildoj de registrita filmo.

bildstreko 配图

= bildotrako

bildotrako, bildtrako 配图

bildregistraĵo de filmo aparte de la sonregistraĵo.

fr: bande-image

bolivudo 宝莱坞

la hinda filmindustrio kaj ĝia stilo de filmoj, nomata imite al holivudo kun "b" por bombajo (mumbajo).

en: bollywood

fr: bollywood

it: bollywood

C

cinemaskopo 宽银幕技术

procedo ekuzita en jaro 1953a, kiu vastigas la kadron kaj plibonigas la impreson de spaco per filmado tra anamorfoza lenso.

en: cinemascope

fr: cinémascope

it: cinemascope

cito 效仿

imito de sceno, persono aŭ alia rekonebla detalo de alia filmo.

fr: citation

it: citazione

Ĉ

ĉefrolulo, ĉefa rolulo 主角

precipa rolulo en filmo.

fr: héros, personnage principal

D

demalsupra plano 仰视镜头

plano rigardanta al la filmaĵo de malsupre supren.

en: ground angle shot, low angle

fr: contreplongée

desupra plano 俯视镜头

plano rigardanta al la filmaĵo de supre malsupren.

en: high angle shot

fr: plongée

dialogisto 对白作家

verkisto de filmdialogoj.

en: dialogue writer

fr: dialoguiste

it: dialoghista

dissolvo 渐弱; 渐淡

= fado

dokumentario 纪录片

= dokumentfilmo

dokumentofilmo, dokumenta filmo 纪录片

filmo prezentanta temon el la realo, nefikciaĵon.

en: documentary

fr: documentaire

it: documentario

dramo, drama filmo 故事片

filmo kun realisma temo kaj alterno de diversaj etosoj, gajaj, malgajaj...

en: drama, drama film

fr: film dramatique

it: film drammatico

dublado 配音

revoĉado de filmdialogoj en alia lingvo, akordanta vortojn kun lipmovoj.

en: dubbing

fr: doublage (des paroles)

it: doppiaggio

E

efekto 效果

arta almeto al la bildaj aŭ sonaj registraĵoj de filmo.

en: sfx, special effect

fr: effet spécial

it: effetto speciale

ekrano 银幕

surfaco, sur kiu oni vidigas filmon.

en: screen

fr: écran

it: schermo

eksterkadra 镜外

ekster la spaco, kiun la filmilo vidigas.

en: off camera

fr: off, hors champ

it: fuori campo

eksterscena 镜外

= eksterkadra

enkadra 镜里

en la spaco, kiun la filmilo vidigas.

en: on camera, on field

fr: dans le champ

enscena 镜里

= enkadra

erotika filmo 色情片

filmo prezentanta scenojn de amindumo kaj amoro.

en: erotic film

fr: film érotique

it: film erotico

F

fado 渐弱；渐淡

malintensigo de la bildo ĝenerale uzata por fini planon.

en: fade

fr: fondu

it: dissolvenza

fado al nigro 渐黑

efekto markanta finon de bildo per iompostioma mallumigo.

en: fade to black
 fr: fondu au noir
 it: dissolvenza in nero
 fado-malfado 渐弱渐强
 efekto markanta ŝanĝon de plano per iompostioma madensigo de la unua kaj supermeto de la dua.
 en: mix
 fr: fondu enchainé
 it: dissolvenza incrociata
 feliĉa fino 大团圆
 feliĉa situacio, kiu finas la rakonton de filmo.
 en: happy end
 fr: happy end
 figuranto 跑龙套
 = statisto
 filmilo 电影摄影机
 ĉia aparato, per kiu oni registras filmojn.
 en: movie camera
 fr: caméra
 filmfirmao, filmkompanio 电影公司
 firmao, kiu faras filmojn.
 en: film production company
 fr: studios, société de production
 filmkritikisto 电影评论员；影评人
 = filmrecenzisto
 filmo 电影
 verko el moviĝaj bildoj.
 en: film, movie
 fr: film
 it: film
 filmografio 电影集锦
 = filmolisto
 filmolisto 电影集锦
 listo de filmoj de sama reĝisoro, de sama temo aŭ iel interrilataj.
 en: filmography
 fr: filmographie
 it: filmografia
 filmrecenzisto 电影审查官
 homo, kiu prezentas kaj pritaksas filmojn por la publiko.
 en: film critic
 fr: critique de cinéma
 filmserio 电影连续剧
 pluraj filmoj kun komuna rakontfadeno, komunaj roluloj...
 en: serial

fr: film à épisodes, série
filmoteko 电影馆
loko konservanta kaj disponiganta filmojn.
en: cinematheque
fr: cinémathèque
it: cineteca
fora plano 远景
vasta bildo kun dekoro, en kiu rolantoj aperas malgrande.
en: long shot
fr: plan général
it: campo lungo, cl

H

hororfilmo 恐怖片
= terurfilmo
holivudo 好莱坞
la usona filmindustrio kaj ĝia stilo de filmoj, precipe kiel produktata en la
samnoma kvartalo de losanĝeleso.
en: hollywood
fr: hollywood
it: hollywood

K

kadralterno 画面转换
procedo, en kiu la bildo alternas inter du kontrastaj direktoj, ekzemple inter la
vizaĝoj de du kunparolantoj.
en: shot reverse shot
fr: champ-contrechamp
it: campo-controcampo
kadro 画面尺寸 (大小)
tio, kio videblas en la bildo, kontraste al eksterkadroj.
en: field size
fr: champ
it: campo
kameraisto 摄影师
teĥnikisto funkciiganta kameraon.
en: camera operator
fr: cadreur, opérateur de prises de vue
it: operatore di ripresa, cameraman
kamerao 摄影机
filmilo, aparato dediĉita al filmado.
en: camera
fr: caméra
it: macchina da presa

katastroffilmo 灾难片
 filmo prezentanta katastrofojn, detruojn kaj iliajn sekvojn en la vivo de homoj.
 en: disaster films
 fr: film catastrophe
 it: film catastrofico

kinaĵo, kinofilmo 电影
 filmo taŭga por projekcio sur granda ekrano.
 en: movie
 fr: film de cinéma

kinejo 电影院
 loko, en kiu oni publike projekcias kinaĵojn.
 en: cinema, movie theater
 fr: cinéma, salle de cinéma
 it: cinema

kino 电影 (艺术)
 = kinarto

kinoĵurnalo 电影海报片
 filmita ĵurnalo prezentata en kinejo, ordinare antaŭ la ĉefkinaĵo.
 en: newscast
 fr: actualités

kinarto 电影艺术
 arto pri farado de kinofilmoj.
 en: movie
 fr: cinéma, septième art

kinoramo 宽银幕立体电影
 procedo de bildigo sur tre larĝa, kurba ekrano dank' al registrado per pluraj kameraoj.
 en: cinerama
 fr: cinérama
 it: cinerama

klipo 音乐电影
 = muzikfilmeto

komedio, komedia filmo 喜剧片
 filmo kun realisma temo, amuzaj aŭ ridigaj scenoj kaj feliĉa fino.
 en: comedy, comedy film
 fr: film de comédie
 it: film commedia

kontribuaro, kontribulisto 片头字幕
 surekrana listo de la filmfarintoj, ordinare komencanta aŭ finanta la prezenton.
 en: credits title
 fr: générique
 it: titoli di testa, titoli di coda

krimfilmo, krimofilmo 警匪片

filmo prezentanta krimojn kaj prienketadojn.
en: crime film
fr: film policier, film noir
it: film poliziesco, film giallo
kromvendaĵo 电影副产品
objekto rilata al kinofilmo kaj vendata de filmkompanio: diska registraĵo,
vesto, ludilo...
en: tie-in
fr: produit dérivé
kulturfilmo 纪录片
= dokumentofilmo
kunmeto 剪接
aranĝo de planoj, bildoj kaj sonoj, el kiu rezultos finfarita filmo.
en: film editing
fr: montage
it: compositing

L

longa filmo 长片
filmo daŭranta pli ol 60 minutojn.
en: full length film, feature film
fr: long métrage
it: lungometraggio
luktofilmo 功夫片；武打片；动作片
filmo prezentanta multajn scenojn de korpa batalo, plejofte el orientaziaj
luktartoj.
en: martial arts film
fr: film d'arts martiaux
it: film di arti marziali

M

mallonga filmo 短片
filmo daŭranta ĝis 30 minutoj aŭ iom pli.
en: short film, short length movie
fr: court métrage
it: corto, cortometraggio.
malrapidigo 慢镜头
bildefekto kiu montras malrapidigitajn movojn surekrane.
en: slow motion
fr: ralenti
it: rallenty, slow-motion
mantelo kaj spado-filmo 剑侠片；侠盗片
filmo prezentanta aventurojn kaj batalojn en historia medio eŭropa inter la 16a
kaj 19a jarcentoj.

- en: swashbuckler film
 fr: film de cape et d'épée
 it: film di cappa e spada
- meza plano 中景
 bildo en kiu la rolantoj aperas plenkorpe kaj okupas grandan parton de la spaco.
 en: mid shot
 fr: plan moyen
 it: campo medio, cm
- mezlonga filmo 中片
 filmo daŭranta proksimume inter 30 kaj 60 minutoj.
 fr: moyen métrage
 it: mediometraggio
- mezproksima plano 中近景
 bildo en kiu la rolantoj aperas ekde la femuroj supren.
 en: close medium shot
 fr: plan américain
- moviĝa plano 推拉镜头
 plano dum kiu la vidpunkto moviĝas en la filmata spaco, dank' al filmilo metita sur reloj, sur veturilo aŭ alia procedo...
 en: dolly shot, tracking shot, track shot
 fr: travelling
 it: carrellata
- munto 剪接
 = kunmeto
- muzikfilmeto 音乐电影
 mallonga filmo ilustranta muzikaĵon, ordinare kanton kun figurado de la kantisto.
 en: video clip
 fr: clip
- P**
- panoramo 全景
 plano dum kiu la filmilo turniĝas horizontale, montrante al sinsekvaj ĉirkaŭdirektoj.
 en: panning
 fr: panoramique horizontal
- peplofilmo 骑士电影
 filmo prezentanta aventurojn en la antikva greka-romia medio ("peplo" estas antikva manteleto agrafita trans unu ŝultro).
 en: peplum, sword-and-sandal film
 fr: péplum
 it: peplum
- personaro 演员表; 班底

- listo de rolistoj aperantaj en filmo.
en: cast
fr: distribution
it: cast
- plano 镜头
senrompa bildigo karakterizata de la situo, proksimeco kaj moviĝo de la filmilo rilate al filmaĵo.
en: shot
fr: plan
it: inquadratura
- produktisto 制片人
homo, kiu mone kaj rimede organizas la faradon de kinofilmo.
en: producer
fr: producteur
it: produttore cinematografico
- projekcii 放映
surekranigi per lumĵeto.
en: to project
fr: projeter (un film)
it: proiettare
- proksima plano 近景
bildo en kiu la rolantoj aperas ekde la brusto supren.
en: close shot
fr: plan rapproché
- R**
- rakonto 故事
tuto de agadoj kaj okazaĵoj prezentataj en filmo.
en: screenplay, story
fr: histoire, scénario
- rapidigo 快镜头
bildefekto kiu montras rapidigitajn movojn surekrane.
en: time-lapse
fr: accéléré
it: accelerazione
- reĝisoro 导演
homo, kiu gvidas la elfaradon de kinofilmo.
en: director, stage manager
fr: réalisateur
it: regista
- rekvizito 道具
ĉia objekto uzata en la dekorado kaj agado de kinofilmo.
en: propertie, prop
fr: accessoire

rekvizitisto 道具师
teĥnikisto pri farado kaj provizado de rekvizitoj.
fr: accessoiriste

retrosceno 倒叙
sceno, kiu revenigas al pli frua tempo de la rakonto.
en: flash-back
fr: flash-back

retrospektivo 电影作品回顾展
prezentado de samtemaj, samreĝisoraj aŭ iel interrilataj filmoj en unu aŭ pluraj projekciejoj.
fr: rétrospective
it: retrospettiva

reverko 重拍; 翻拍
imito de malnova kinaĵo per pli novaj rimedoj.
en: remake
fr: remake
it: remake

rolisto 演员
homo, kiu profesie figuras kaj agas en filmoj.
en: actor
fr: acteur

rolo 扮演
figurado de aparta homo aŭ funkcio en filmo.
en: part
fr: rôle

rolulo 角色
unu el la homfiguroj videblaj en filmo, precipe en fikcia filmo.
en: character
fr: personnage

rompo (镜头的) 切换
ŝanĝo de plano en la bildfluo de filmo.
en: cut
fr: coupe, cut

S

sceno 场景
parto de filmo okazanta sen temporompo, kun difinitaj roluloj, en difinita loko.
en: scene
fr: scène, séquence

sciencfikcia filmo 科幻片
filmo prezentanta aventurojn en fikcia estonteco sur la tero aŭ en imagitaj lokoj de la kosmo.
en: science fiction film
fr: film de science-fiction

it: film di fantascienza
 sf-filmo 科幻片
 = sciencfikcia filmo
 skriptisto 编剧
 verkisto de filmskriboj.
 en: screenwriter, scenarist, script writer
 fr: scénariste
 skripto 电影剧本; 脚本
 antaŭplano de filmo, tekste prezentanta agadojn, dialogojn...
 en: script
 fr: scénario
 sonefektisto 音效师
 tehnikisto, kiu almetas bruojn, sonojn al filmo.
 en: folex artist
 fr: bruiteur
 it: rumorista
 sonefekto 音效
 arte almetita sono de filmo.
 en: sound effect
 fr: bruitage
 sonkunmeto 混音
 aranĝo de muzikaĵoj, registritaj aŭ alifontaj sonoj por fari la definitivan
 sonotrackon.
 en: audio mixing
 fr: mixage
 sonotrako, sontrako 配音
 sonregistraĵo de filmo aparte de la bildregistraĵo.
 fr: bande-son
 it: colonna sonora
 sonstreko 配音
 = sonotrakto
 sonotrako, sontrako 配音
 sonregistraĵo de filmo kontraste al la bildregistraĵo.
 en: soundtrack
 fr: bande son, piste sonore
 it: colonna sonora
 statisto 跑龙套
 plenumanto de duaranga, senparola rolo.
 en: extra
 fr: figurant
 it: comparsa
 stelulo 影星; 电影明星
 fama rolulo.
 en: star

fr: vedette
streĉo 悬念
maltrankvilo kaŭzata de prokrastado de atendata okazaĵo en filmrakonto. .
en: suspense
fr: suspense
studio 摄影棚
loko kun scenejoj kaj ekipoj por filmado.
en: studio
fr: studio
stuntado 替身
= vicrolado
stuntisto 替身演员
= vicrolisto
subteksto 字幕
traduko de fremdaj filmparoloj subskribita sur la bildoj.
en: subtitle
fr: sous-titre
subtitolo 字幕
= subteksto
suspensio 悬念
= streĉo

Ŝ

ŝminkisto 化妆师
teĥnikisto ŝminkanta la rolistojn antaŭ figurado.
en: make up artist
fr: maquilleur

T

terurfilmo 恐怖片
filmo prezentanta timigajn scenojn: kruelaĵojn, perfortojn, mortigojn...
en: horror film
fr: film d'horreur
it: film horror
truko 特技
procedo por krei efekton.
fr: trucage, truquage

V

vakerfilmo 西部片; 牛仔片
filmo prezentanta la vivon de vakeroj kaj aliaj figuroj de la historia okcidenta fronto nordamerika.
en: western
fr: western

it: film western
vesterno 西部片
= vakerfilmo
veturofilmo 公路电影
filmo kun veturadoj kaj laŭvojaj lokoj kiel ĉefaj scenejoj.
en: road movie
fr: road movie
it: road movie
vicaktoro 替身演员
= vicrolisto
vicrolado 替身
rolado far anstataŭanto de la normala rolisto okaze de ekzemple danĝera
sceno.
en: stunting
fr: doublage (d'acteur)
vicrolisto 替身演员
profesiulo, kiu laŭbezone rolas anstataŭ la normalaj roltenantoj.
en: stunt man
fr: doublure
it: controfigura

___Fino___